Bolanta Kaldrono

INFORMILO ***273 de la***
Esperanto - Grupo Bremen
Decembro 2004 – Februaro 2005

Sekr: D-ro Hans Walter Krüger, Dordrechter Str 36, 28259 Bremen, Tel: 0421 561943
Informoj: Prezidanto OstR Hellmut Grebe, Tel: 0421 3963480
Kasistino: Ruth Bohn, Tel: 0421 382715
Red: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen, Tel: 8476806

Vizitu nin en Interreto: **www.esperanto.de/bremen**
Dort präsentieren wir unser aktuelles Programm und unsere Zeitung Informilo

Korajn bondezirojn

feliĉajn festotagojn

Feliĉan Adventan Tempon.

Benitajn Kristnaskon kaj
festotagojn al niaj gemembroj kaj al
ĉiuj niaj geamikoj.

Nia Programo

(Ĝenerale ni kunvenas je la 20-a horo en nia kunvenejo Brodelpott)

10an de Novembro: Travivaĵoj en via feria tempo. La membroj raportas pri feriaj travivaĵoj.

08an de Decembro: Zamenhoffesto. Invitas familio Kruse. Ni renkontiĝos en Lemwerder je 20:00 h. Sur aparta folio vi trovas mapon, kiu montras kiel atingi la domon de familio Kruse en Lemwerder, Elsflether Weg 3. Bonvolu anonci vian partoprenon, telefono 0421-670696.

12an de Januaro 2005: Ni bonvenigu la Novan Jaron. Ni esprimu niajn dezirojn kaj esperojn.

09an de februaro: Unsere Jahresversammlung

Tagesordnung:

1. Begrüßung
2. Wahl des Protokollführers und Wahlleiters
3. Bericht des Schriftführers
4. Bericht der Kassiererin
5. Bericht der Revisoren
6. Redaktoro des Informilos
7. Entlastung des Vorstandes
8. Entlastung der Kassiererin
9. Wahl des Vorstandes und der Revisoren
10. Unsere 100.–Jahrfeier 2006
11. Verschiedenes (Werbung, Programmgestaltung.

Anträge und Änderungen bis zum 1. Februar an Hellmut Grebe Tel 3 96 34 80
09an de Marto: Lumbildprelego Hellmut Grebe..

Invitas la Esperanto – Grupo Unterweser e. V.
Marde, la 26an de oktobro je la 19.30 a horo en Oldenburg, Teatro Cafe, Theaterwall 22 en Oldenburg.
Marde, la 23n de novembro je la 19.30 a horo en Brake, gastejo Landhaus am Stadion 4.por festi la Zamenhoffeston.
Anoncu vian partoprenon ĝis la 15a de novembro ĉe Anne Höpken.

Retrospegulo

Kunveno en Elsfleth, la 18an de aŭgusto. La grupo Unterweser invitis nin partopreni en ilia rondo. Ĉar Anne raportis pri siaj travivaĵoj en la UK en Pekino kaj ankaŭ por reciproki la viziton de nia gastigantoj, ni venis tre volonte.
Ni estis sufiĉe frue en Elsfleth por iom rigardi la beletan urbon. Ni, tio estis Hellmut, kiu ŝoforis nin, Ruth, Lisa kaj Dieter. Oni gvidis nin en beletan salonon de la restoracio «Wisura». Ni povis facile superrigardi la foirejon kaj ankaŭ la fervojan trafikon. Regis bonhumoro en la rondo kaj, post kiam alvenis ankaŭ Elisabeth kaj Franz, la salono denove estis plenplena. Post la komuna vespermanĝo komencis Anne paroli pri la fora UK. Ŝi preparis belajn bildojn, kiujn ni laŭvice rigardis. Ni bone povis sekvi al la rakontoj pri ŝiaj aventuroj en la renkonto

kun la multnombraj aziaj kongresanoj kaj, same interese, la nekutimaj manĝadoj kaj manĝaĵoj, ni pensu nur pri la perbastoneta manipulado.
Ni kore dankis pri la invito kaj pri ĉiuj afablaĵoj. Jam la fakto, ke ni nur estis hejme 10 minutojn antaŭ noktomezo pruvas, ke estis bela kunveno. Koran dankon!

Dieter Hartig

Diskuto pri aktualaĵoj, gvidis Kurt Meyer, 08.09.2004

Mi tuj komence devas pardonpeti, ke mi nur fragmente memoras la enhavon de la (cetere tre vigla) diskuto pri aktualaĵoj, kiun preparis kaj gvidis Kurt Meyer por la kunveno je la 8a de septrembro. Mi limigos min do al tiuj kelkaj eroj, kiuj restis en mia memoro. Partoprenis ne nur Bremenaj grupanoj, sed ankaŭ du gastoj de la grupo Unterweser.
Nu, komence preskaŭ ŝajnis, ke la aranĝo fariĝos diskuto pri -ata/-ita, ĉar Kurt komencis sian enkondukon per la demando, ĉu la anonco de lia programero en la Informilo estas gramatike ĝusta. La Informilo informis, ke la vespero estas "aranĝ**it**a kaj gvid**it**a" de Kurt Meyer, dum la anonco en nia interreta paĝo diras, ke ĝi estas "aranĝ**ot**a kaj gvid**ot**a". Tuj estiĝis bela diskuto. Mi volas nek raporti detalojn pri ĝi nek doni respondon al la demando, sed nur mencii mian impreson, ke tiu gramatika demando trovis grandan intereson kaj ke laŭ mi indas pli ofte trakti ĝuste tiajn iom pli komplikajn lingvajn temojn.
Sed tio ne estis la vera temo de la vespero, kaj Kurt direktis la diskuton al kelkaj aktualaj demandoj. La unua estis, ĉu kaj kiujn filmojn la partoprenantoj spektis lastatempe. Li mem raportis pri du aŭ tri filmoj, kiujn li rigardis kaj kiuj impresis lin, kaj ankaŭ la aliaj kontribuis siajn spertojn. Hazarde (ĉar mi tre malofte vizitas kinejon) ankaŭ mi mem povis rakonti pri du filmoj, kiujn mi ĵus estis spektinta.
Mi ne memoras, kiel ni venis al la temo, sed ni iom longe diskutis pri magazenoj, interalie ke ankaŭ en Bremeno montriĝas la tendenco, ke grandmagazenoj, precipe rande de la urbo, forsuĉas la klientaron el la urbocentro, kio devigas multajn malgrandajn vendejojn al fermiĝo. Elisabeth raportis pri tute kontraŭa sperto el Romo, kien ŝi vojaĝis antaŭ iom da tempo. Ŝi tie vidis nek grandmagazenojn, nek iujn el la kutimaj grandaj magazenĉenoj, kiujn oni trovas preskaŭ ĉie.
La lastan temon Kurt enkondukis per sia observo, ke germanoj montras fortan emon al malkontento kaj plendado, aludante per tio ankaŭ al la protestoj kontraŭ aktualaj ekonomipolitikaj reformoj. Kaj li iom provoke demandis, ĉu la aliaj opinias same kaj ĉu iu emus elmigri Germanion pro malkontento - kaj eventuale kien. Ankaŭ tiu temo instigis interesajn opiniesprimojn. Montriĝis, ke ja iuj havas siajn kritikojn pri diversaj aferoj - sed ke finfine ĉiuj restos ĉi tie.

Franz Kruse

Kunveno la 13 an de oktobro

Ni renversis la programojn de la 13-a de septembro kaj tiu de la 10-a de novembro, ĉar nia prezidanto Hellmut Grebe malsaniĝis kaj tial ne povis partopreni. Al feriaj travivaĵoj li sendube povas interese kontribui.
Ni do ludis. Estas menciinda konstato, ke ĉe ludado ĉiuj membroj pleninterse partoprenas – evidente estas porstrestaĵo el la infanaĝo. Mi observis ankaŭ ĉifoje, ke Elisabeth (kiel profesia infanĝardena edukistino) kunprenis la plej interesajn ludilojn kiuj ankaŭ cerbon kaj lingvon trajnadas. Same interesaj estis la kunprenitajn ludilojn de Gunthild kaj Kurt Meyer.

Dieter Hartig raportis pri la kongreso en Gelsenkirchen. Jen kunvenis kaj loĝis la fervojistaj esperantistoj en la IC-hotelo rekte apud la stacidomo. Estis tre agrabla kunveno, kvankam la mebroj prezentis terure altan averaĝan aĝon. Elstare estis la veturo per historia relbuso tra stacioj de iamaj minejoj kaj uzinoj. La tuta regiono konstistis el kadukaj, forlasitaj instalaĵoj.
En tiu kunveno partopenis ankaŭ Bodo Ehrlich. Li sendas al la grupanoj tre korajn salutojn. Li intencas viziti la grupvesperojn, se li estos deĵore en Bremen.

Reen al la ludkunveno: Ni ludis en du rondoj, do sur diversaj tabloj per diversaj ludiloj. Sur unu el la tabloj oni formis per kartoj,sur kiuj estis po unu litero. Per tiuj kartoj oni devis formi vortojn kaj ankaŭ ĉenvortoj. Formiĝis jam baldaŭ tiom da vortoj, ke la kunmetitaj tabloj estis plenplenaj. En la konstanta reto oni serĉis truojn por la konstruo de novaj esperanto vortoj.
Sur la alia tablo oni ludis per triangulaj ludŝtonoj, kies anguloj havas diversnombrajn poentojn. La kunordigo de la ludŝtonoj laŭ la nombro de la poentoj estis sufiĉe tikla afero kaj okupis la ludantojn kaj ties lertecon.
Pro la progresita tempo ni devis fini la interesan okupon. Ni dankis Elisabeth Kruse kaj la membrojn kiuj ankaŭ kunprenis ludojn, kiuj ebligis tiun interesan vesperon.

Dieter Hartig

Anonco

Dieter Hartig petas vian subtenon en kolektado de

Korkoj (korkŝtopiloj)

por la korkkolektado de NABU.

Indas ja subteni la naturprotektantojn.

(Naturschutzbund)

Kunprenu korkŝtopilojn al niaj kunvenoj.



Por la jaro 2005 ni deziras sanon kaj feliĉon al vi ĉiuj.

Precipe ni deziras pacon en la mondo!

Por nia Grupo Bremen, en la 99-a jaro de sia ekzisto, bonan progreson.